

August Heinrich Hoffmann,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Surkampare iĝas
ree nun vesper',
milde subeniĝas
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas
rivereta flu',
kaj la akvo fluas
ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu
ĝin je l' tagofin',
kaj vesper' neni
ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace
strebas ankaŭ vi,
vi ripozos pace,
nur se volos Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1988-04-16.*

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.